# *Havano: subskribo de paca interkonsento por Kolombio.*



?i-semajne la delegitaroj de la kolombia registaro kaj de la armitaj fortoj FARC-EP informis pri la decido subskribi interkonsenton por ?esigi la militon kaj agresemon amba?flanke kaj definitive por Kolombio.

La ceremonion prezidis Juan Manuel Santos, prezidento de Kolombio, la komandanto de la FARC-EP, Timoleón Jiménez, kaj flanke de la garantiantaj landoj, Kubo, la prezidento Raúl Castro, kaj de Norvegio, la kanceliero Borge Brende.

Reprezentante la akompanantajn landojn partoprenis la prezidentino de ?ilio, Michelle Bachelet kaj de Venezuelo, Nicolás Maduro.

Anka? ?eestis la ?enerala sekretario de UN, Ban Ki-Moon kaj ?tatestro de Dominga Respubliko, kiel prezidanto de la Komunumo de Latinamerikaj kaj Karibiaj ?tatoj (CELAC), kaj de Salvadoro, plus specialaj senditoj de Usono kaj la E?ropa Unio.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/98142-havano-subskribo-de-paca-interkonsento-por-kolombio

# Radio Habana Cuba